

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ROJ 548-9 (7-8) JUL.-AŬG.
1951



Fototipoj: Eldona Societo

Sur la flosa Kon-Tiki (*vidu p. 204*)

Jul.-Aŭg. 1951

N-ro 548-9 (7-8)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
 Palais Wilson, Genève, Svis.
 Urgajn informojn sendu rekte
 al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. angla (kun membreco kaj jarlibro 12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paço £6	$\frac{1}{2}$ paço £3
$\frac{1}{2}$ paço 30 sêl.	$\frac{1}{8}$ paço 15 sêl.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldonnumero 6500



Enhavo

Specialaj artikoloj :

Internacia Esperanto-Muzeo : Hans Jakob	193
Veteranoj	194
De Abisenujo en la tutan mondon : trad. G. F. A. Milanowski	197
Memorigo de ne-ekzistinto : F. Hayotte..	201
Rimarkoj pri pralingvo tuthomara : L. Laurat	209
Kiel sukcesi	211

Konstantaj rubrikoj :

36-a U.K.	..	..	..	..	..	194
Tra la mondo Esperantista	..	..	..	..	..	195
Monata letero : <i>Stockholm</i> : F. Szilágyi			..	..	..	200
Vivo Virina	..	..	..	..	..	203
Tra la libraro : <i>Ekspedicio Kon-Tiki</i> (M.S.) ; <i>Sveda Novelaro</i> (M.S.) ; <i>La 13a Mortis</i> (C. D. A. Capp)	..	..	..	..	..	204
Enigma konkurso N-ro 60					..	207
Esperanto kaj Radio		..	..	..	..	208
Internacia Konkurso 1951		..	..	..	..	212
Kio estas via V.-K. ?	..	..	..	..	..	212
Felietono	..	..	..	..	..	213
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..	215
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	216

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-roj 548-9 (7-8)

Julio-Aŭgusto 1951



Hans Jakob :

Internacia Esperanto-Muzeo

Esperantista Panteono

KIO diferencigas nian movadon de ĉiu alia klopodado propagandi la ideon de internacia lingvo, estas la neforigebla fakto ke ekzistas *popolo* kiu uzas la lingvon, ke Esperanto ne estas retorta kombinaĵo, sed posedas atentindan literaturon kaj fine, ke ĝi havas tradicion. Nia movado fariĝis grava faktoro en la internacia vivo kaj se ne realiĝis ĝis nun ĉiuj niaj deziroj, tio grandparte ŝuldiĝas al okazaĵoj ne dependaj de nia volo kaj neniel influeblaj de ni.

Kompetentaj homoj inter ni jam frue pensis pri la kolekto de ĉio, kio tuŝas nian aferon. Ne nura arkivo, sed centro de konstanta dokumentado. El tiu penso naskiĝis la diversaj bibliotekoj ekzistantaj kaj ekzistantaj, nome, de la iama Centra Oficejo Esperantista en Parizo, de Georgo Davidov en Saratov, de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig, de la Brita Esperantista Asocio en Londono, de U.E.A. en Genève kaj de aliaj kolektoj pli malpli ampleksaj. Ĉi tiuj bibliotekoj (malaperis tiu de Leipzig) dankas sian ekziston al la oferemo de kelkaj pioniroj de nia movado. La metodan prizorgadon ni ŝuldas al la persisto

kaj pacienco de aro da personoj, laborantoj konataj kaj nekonataj de la publiko. La biblioteka kaj bibliografia laboro estas esence bonvola, sensalajra. Dum ankoraŭ longa tempo nia movado ne kapablos salajri kompetentan personaron por la plej necesa prilaboro de nia spirita trezoro. Eble iam troviĝos mecenato, kiu destino kapitalon sufiĉan por vivteni, sendepende de asocia budĝeto, la bibliotekon.

Serĉante novan vojon por krei centron de dokumentado alireblan de la ĝenerala publiko, kaj samtempe por montri tion, kion kreis la movado, aŭstra samideano, Hugo Steiner iniciatis la kreon de Muzeo en 1928. Ne mirige estas, ke ankaŭ ĝi renkontis mokojn, ridon kaj rifuzon ĉe iuj esperantistoj. Sed la iniciatinto ne laciĝis, kaj sukcesis. La esenca trajto de la Internacia Esperanto-Muzeo estas, ke ĝi ne dependas materie de la movado, due, ke la ejo kie troviĝas la kolektita materialo estas digna. Tion sukcesis la iniciatinto kaj la Muzeo formas parton de la Nacia Biblioteko Aŭstria kaj troviĝas en la pompa imperia

(daŭrigo malsupre de p. 194)

Veteranoj

Dum la U.K. en Parizo okazis kunveno de samideanoj, kiuj povas pretendi al veteraneco. Temas pri personoj kiuj aliĝis al Esperanto antaŭ la fino de la jaro 1900. Ankaŭ aliaj partoprenis, kiuj aliĝis al la afero antaŭ 1910.

S-ro M. Lewin, Del. de U.E.A. en Dunstable, Anglujo, kolektas informojn pri ĉi tiu unika fako de nia movado kaj bonvenigos detalojn fidindajn. Laŭ lia listo jen niaj veteranoj:

Nylén (1892); Argentot, Chavet (1896); Lewin, Vasiljev (1900); Camozato (1901); Bastien (1902); Ducommun, Royer (1903); Collinson, Couteau, Jeangirard, Mittey, Moller, Musella, Pion, Sakowicz, Stamatiadis, Warnier (1904); Bünemann, Butin, Ges-oj Butler, Compte, Dubois,

François, Hans Jakob, May (1905); Hide, Le Seach, Redpath, Remont, Saratto (1906); F-ino Baird, Bartel, Bugge-Paulsen, Dronchat, Goldsmith, Herlemont, Hirst, Ingham, Ges-oj Jacobs, F-ino Noll, Paulson, Saggiori, Smith, Tisson (1907); Ginz-Pasha, Nilsami, Parker, Sirk (1908); Agache, Aymonnier, Bennemann, Dalmau, Downes, Ges-oj Isbrucker (1909); Adamson, Ges-oj Applebaum, Jung, Kennedy (1910).

S-ro Lewin ne povas garantii la absolutan ĝuston de la informoj ricevitaj, kaj bonvenigus korektojn aŭ modifojn.

36-a U.K.

München, 4-11 aŭg., 1951

(daŭrigo)

palaco la fama Hofburg en Vieno, kaj ricevas ĉiujare ŝtatan subvencion.

Brilan ideon efektivigis samideano Steiner per la kompletigo de la Muzeo, iniciatinte kreon de Esperantista Panteono. Eble iuj ridas pri la vorto *panteono*, kaj specife Esperantista. La plano estas, kunigi en vasta salono la portretojn de la *pioniroj* de nia movado, la plej distingaj laborantoj.

La inaŭguro de la Esperantista Panteono okazis 3-an de junio. Partoprenis pluraj eminentaj personoj el la socia vivo de Aŭstrujo. Priskribo pri la ceremonio aperos en venonta numero.

Statistiko ĝis 4 jun.: Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 26, Belgujo 28, Brazilo 4, Britujo 195, Ĉeĥoslovakujo 4, Danlando 37, Egiptujo 5, Finnlando 19, Francujo 178, Germanujo 608, Hispanujo 6, Irlando 6, Islando 1, Italujo 67, Jugoslavujo 14, Kubo 1, Maroko 6, Nederlando 43, Norvegujo 19, Nov-Zelando 1, Polujo 7, Portugalujo 1, Sarlando 10, Sud-Afriko 1, Svedujo 130, Svisujo 26, Triesto 4, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 12. Sumo 1463 el 32 landoj.

Konstanta Kongresa Sekretario.

S-ro O. T. Nicolaisen eksiĝis el tiu ofico, kiun nun okupas S-ro Mason Stuttard. De nun oni skribu al S-ro Stuttard ĉe la kongresa adreso.



Tra la Mondo Esperantista



Belgujo

Kongreso de R.B.L.E. : Organizite en Bruselo la 35-a kongreso de R.B.L.E. altiris 130 gesamideanojn, inter kiuj troviĝis kelkaj eksterlandanoj. Sabaton la 12 majon kunsidis Belga Esperanto-Instituto, la malnova eldona kaj librovenda kooperativa societo. Laborkunsido de la kongreso estis okupita precipe pri la demando: *Esperanto en la radio*. Sekvis oratora konkurso kun reprezentantoj de diversaj grupoj, kaj gajnis unuan premion F-ino Henny De Ketelaere (Antverpeno). Arta festo okazis en la vespero. En la dimanĉo solena kunsido okazis en la urbdomo, kie reprezentanto de la urbestro transdonis salutojn. Diversaj promenoj, vizitoj kaj balo kompletigis la programon de la tago. London oni faris ekskurson per tramo tra pitoreskaj regionoj valonaj. Oni renkontiĝos venontjare en Bruĝo.

Brazilo

Oficiala rekono : La magistrato de Santos decidis oficiale enkonduki Esperanton en la loka Komerca Instituto pere de subvenciataj kursoj. Jam en la lastaj tagoj de februaro komenciĝis la oficialaj kursoj.

Venontjara kongreso : Oni faris decidon, ke la XIII-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos en Recife, ĉefurbo de Pernambuco en 1952. La dato estas 9-16 feb.

Britujo

Landa kongreso : Okazis dum la pentekostaj tagoj la 35-a kongreso de la Brita Esperantista Asocio. Konataj eroj karakterizis la kongreson: Interkona vespero, balo, teatra prezento, ekskursoj, diservo, oficiala akcepto. La kunsido de la Asocio traktis multajn rutinajn aferojn, sed gravis la ekzigo de la multjara sekretario S-ro Wilkinson, Lin anstataŭos S-ro J. W. Leslie, nuna delegito de U.E.A. por Londono. La rea elekto de S-ro Gething en la prezidanta ofico estis konfirmata. Laŭ multaj opinioj ĝi estis inter la plej bone organizitaj kongresoj en la serio. Por 1952 oni elektis Newcastle-on-Tyne kongresurbo.

Francujo

Esperanto-en foiro : Dum majo la budo de Esperanto en la granda Foiro de Parizo, kiel ĉiujare, faris impreson ĉe la publiko. Notinde estas ke komercaj foiroj estas grava agadkampo por la internacia lingvo. Komercistoj kaj aliaj petu informojn en Esperanto de: Foire de Paris, 23 Bd.-des-Victoires, Paris, kaj eksterlandanoj aldonu: "Esperanta traduko ĉe Union Espérantiste Française, 34 rue de Chabrol, Paris X".

Propagando : U.E.F. sendis dum majo 7000 ekzemplerojn senpagajn de la gazeto *Essor*, speciale eldonita por instruistoj.

Germanujo

Katolika movado : La ĉefa organizaĵo de la katolika movado en Germanujo estas K.E.C.G. Ĝi estas sendependa kaj neprofitdona entrepreno. Dum la financa jaro 1950 (ĝis 31.III.51) la Centro havis 620 pagintajn membrojn. La presita informilo *Semisto* aperis trifoje kaj estis sendata ne nur al membroj sed ankaŭ al preskaŭ ĉiuj katolikaj redakcioj en la lando, kaj al multaj eminentuloj. La Centro aperigis entute artikolojn pri Esperanto en 52 gazetoj kaj eldonis 1000 dupaĝajn flugfoliojn.

Oficiala rekono al junularmovado : La 21 aprilon 1951 la Regiona Ligo Baden de la germana sekcio de T.J.O. estis akceptita unuanime kiel "Esperanto-junularo" en la junularan parlamenton (Landesjugendring) de Baden kaj per tio ricevis oficialan aprobon. Tio rezultis ĉefe el la pasintjara agado de T.J.O. en Konstanz kaj ĉar la Esperanto-junularo jam bone kunlaboris kun la diversaj junular-organizaĵoj.

Hispanujo

Kongreso : En la industria urbo Tarrasa okazos 28–30 julio la ĉijara landa kongreso de Esperanto. Informojn ĉe : Organiza Kongreskomitato, San Francisco 52, Tarrasa (Barcelona) Hispanujo.

Italujo

Studenta centro : Fondiĝis en la ŝtata mezgrada lernejo "Col di Lana" en Romo Studenta Esperanto-Centro.

Landa kongreso : La itala landa kongreso okazos en Pisa 9–11 sept. 1951.

Meksikio

Starigo de societo : La esperantistoj en Meksikurbo kuniĝis por formi

societon *Esperanto-Meksika Asocio*, San Juan de Latran 6-224, Meksiko. Konata hispana samideano Fr. Azorin malfermis kurson kun 60 lernantoj.

Nederlando

Junularo : Ju-Ko denove organizas renkontiĝon en Soesterberg, bela regiono de meza Nederlando, 21–29 julion. La kosto estos proks. 25 ned. guld. Provizora programo estas alloga kaj interesa. Informojn aŭ aliĝojn ĉe : Olga Ketting, Westzaanstraat 12, Amsterdam, C, Nederl.

Norvegujo

Jarkunveno : Dum Pentekosto okazis en Oslo jarkunveno de N.E.L. kun proks. 60 partoprenantoj el ĉiuj partoj de la lando, inter kiuj 5 eksterlandaj gesamideanoj. Jarraporto kaj bilanco indikis, ke la pasinta jaro estis tre prospera por la Ligo, kiu interalie dungis 3 eksterlandajn instruistojn. Ĉeftemo en la programo estis : Esperanto en la popollernejo. Krome oni konsideris la kursinstruadon kaj la propagandan ĝeneralan, precipe en rilato kun la estonta U.K. en Oslo. Preskaŭ senŝanĝe la estraro estis reelektata, kun muzea kuratoro C. Støp-Bowitz, prezidanto, kaj Alfred Skyberg, ĝen. sekretario.

Distraĵoj inkluzivis socian vesperon kaj aŭtobusan ekskurson tra Oslo kun vizito al la Kon-Tiki-muzeo, kie S-ro Carsten Brynildsen (tradukinto de la verko en Esperanton) faris interesan prelegon pri la ekspedicio kaj la floso.

Sarlando

Propagando : En Bildstock post agado ĉe Ruĝa Kruco kurso komenciĝis kun 40 lernantoj.

De Abisenujo en la tutan mondon

La kafograjno kiel stimulilo de unua grado

LA hejmlando de la kafo estas la suda parto de Abisenujo, kie ĝi ankoraŭ hodiaŭ kreskas sovaĝe sed ankaŭ estas kultivata en plantejoj. Tial ofte estas supozate, ke la abisena provinco Kaffa donis sian nomon-al la trinkaĵo. Sed en Arabujo, Persujo kaj Abisenujo oni nomas la kafo-planton *bunn*, *bun* aŭ *bon*; la nomo kafo sendube devenas de la egiptaj kaj turkaj vortoj *kahua*, *kahwa*, *kahveh*, *coava* aŭ *chauwe*. Ĉiuj tiuj orientaj vortoj signifas trinkaĵon kiu estas farita el semgrajnoj. Ĉiuj landoj en kiuj oni trinkas kafon akceptas por tiu objekto nomojn devenintajn el la oriento.

Komence de la 15-a jarcento Arabujo importis kafon kaj ŝajnas, ke oni tie en la antaŭ-monteta regiono de Jemen komencis planti kaj kultivi ĝin. Araba kaj abisena plantejo-kafo, kiun oni nomas per la nomo de la urbo *Mokka*, kiel malfalsan mallong-grajnan *moka*, en multaj landoj, precipe en Usono, estas rigardata altvalora.

La unua historie aŭtentika raporto pri kafo estas de la arabo Shibâb-ad-Dîn (meze de la 15-a jarcento). Li raportis, ke la *Mufti* de la urbo Aden—Dŝemal Eddin — renkontis, veturinte al Adjam (en Abisenujo) samlandanojn, kiuj preparis kafon kaj uzis tiun trinkaĵon kiel kuracilon kontraŭ multnombraj malsanoj. Reveninte en sian hejmlandon, li preparigis la kafotrinkaĵon

por si, sentis sin poste multe pli freŝa, kaj konstatis ke la kafo estas ne nur saniga, sed ankaŭ bongusta kaj stimula. Nur de tiu tempo la araboj alkutimiĝis trinki kafon kaj aliaj popoloj lernis tion de ili.

La unua kafejo, Vieno-1683

Leonhard Rauwolf, fama Augsburga kuracisto kaj eminenta



plantesploristo, donis la unuan sciigon pri kafo al Eŭropo. La unua kafejo estis fondata en 1683 en Vieno. La turka sieĝarmeo havis grandan provizon de kafo, kiu poste falis en la manojn de la venkintoj. En Germanujo establiĝis la unuaj publikaj kafejoj ĉirkaŭ la 18-a jarcento. En Bremen oni jam trinkis kafon ĉirkaŭ 1700. Kiel la Senato havis sian vinkelon, tiel ankaŭ la estroj de la negocistaro en la gildodomo posedis la rajton elverŝi kafon.

Al la Nederlandanoj baldaŭ plaĉis la trinkaĵo el la kafograjno kaj la planto estis donata al ĉiuj transmaraj kolonioj, en kiuj la klimato permesis kultivadon. Kvankam en Arabujo baldaŭ estis kultivataj konsiderindaj kvantoj, tiuj ne plu sufiĉis por kontentigi la altiĝantan bezonon. Je la fino de la 17-a jarcento en ĉiuj nederlandaj kolonioj oni zorge kultivis la kafon, kaj baldaŭ eksportis grandajn kvantojn el Javo kaj Batavio.

De Cejlono venis la semgrajno de kafo al Sudameriko, kie germano nomita Hannsback ĝin unue kultivis en Surinamo. Samtempe la angloj enkondukis la kafon en Hindujon. La plej eminenta kaforegiono tamen estas Brazilo, kie iniciatite de la portugala diplomato *de Pombal* jam de 1760 la kafo estas kultivita en specialaj plantejoj.

En Kostariko, Venezuelo kaj Meksikio la kafoproduktado komenciĝis dum la jaroj 1780 ĝis 1790. La kultivado en El Salvadoro komenciĝis en la mezo de la 19a jarcento kaj en Gvatemalo en 1875. Sur altebenaĵoj 800 ĝis 1600 m. super la maro, kie multe da akvo kaj milda varmo tre favoras la kreskadon de la kafarbo, oni kultivas treege valorajn specojn. Post Brazilo Kolumbio estas

la plej eminenta kaforegiono de la mondo, kio ankaŭ dependas de la favora terkvalito kaj la bonaj klimataj kondiĉoj.

Oni principe diferencigas tri ĉefspecojn de la kafoplanto:—1. *Coffea Arabica* (originlando Abisenujo); 2. *Coffea Robusta* (originlando Kongo); 3. *Coffea Liberia* (originlando Liberio). La plej granda parto de la monderikolto estas de la altkvalita *Coffea Arabica*.

La unua speco estas arbo kun ĉiamverdaj folioj, kaj atingas alton de ĝis 6 m. En flegitaj plantejoj oni tamen ne lasas la arbon kreski pli alten ol 2½ ĝis 3 m. Per eltranĉado ĝi kreskas horizontale kaj tio akcelas la fruktoformiĝon kaj tre plifaciligas la deŝiradon. La kafofloro estas blanka kaj havas formon de tubo, kiu finiĝas supre kiel kvinpinta stelo. Ĝia originalaodoro memorigas pri jasmeno. Jam post du tagoj la floroj defalas kaj la fruktoj formiĝas. Tiu ĉi evoluas nur malrapide, kaj pasas meznombre ĉirkaŭ ok monatoj ĝis kiam la kafoĉerizoj estas maturaj.

En Brazilo oni rikoltas en la monatoj majo ĝis aŭgusto, en Venezuelo de aŭgusto ĝis decembro, en Gvatemalo de aŭgusto ĝis januaro, kaj en aliaj mezamerikaj ŝtatoj de oktobro ĝis marto. Nur en Kolombio oni dufoje rikoltas—de aprilo ĝis julio kaj de oktobro ĝis decembro. En la rikoltsezono oni ĉie dungas ĉiujn disponeblajn fortojn—virojn, virinojn kaj infanojn—ĉar la maturaj kafoĉerizoj devas esti kolektataj plejeble rapide. Supermaturaj cerizoj sekiĝas dum kelkaj tagoj kaj tiam ne estas plenvaloraj. Oni rikoltas la kafon nur per la mano. Uzado de maŝinoj ne eblas. La laboristo ŝiras la ĉerizojn de la branĉoj kaj kolektas ilin en korbon pendantan de la

ŝultro. La ĉerizojn oni forportas al preparejoj, kie oni forigas la diversajn perikarpojn kaj liberigas la grajnoj.

Malseka kaj seka preparo

Oni principe distingas du manierojn de preparo ; la malsekan kaj la sekan procedon. Ĉe la unua oni gargaras la ĵus deŝiritajn kafoĉerizojn en kanalo kun fluanta akvo per kio apartiĝas branĉpecoj, folioj kaj nematuraj fruktoj. Maŝino forigas de la bonaj plenpezaj ĉerizoj la pulpon kaj la epikarpon. La malplenaj epikarpoj estas elĵetataj kaj la pulpo iras en turniĝantan cilindro-kribrilon, kiu disigas la pulpon de la grajno kaj tra kies truoj falas la grajnoj. Por liberigi la grajnoj de la algluiĝinta dolĉeta muko, oni fermentigas ilin en ujo 24 ĝis 48 horojn. La puraj *pergamengrajoj* sekigigas per la sun-radioj kaj estas vendataj kiel *pergamenkafo*, kiu poste estas senŝeligata en la ejoj de Hamburgo, Londono kaj aliloke.

La malseka procedo de preparo estas pli longedaŭra sed la kvalito de la kafo kaj la koloro estas pli bonaj. Tiel preparita varo rezultigas multe pli altajn prezojn.

Pli facila kaj malpli multekosta estas la seka procedo. La kafoĉerizoj estas sekigataj sur vastaj betonaj areoj. Oni forigas per unu labor-procedo la pulpon kaj la pergamenŝelon. La kafo estas purigata, pakata en sakojn kaj forsendata. En la marbordaj provizejoj oni devas denove purigi kaj dispecigi ĝin. Ĉe la sekigado oni devas precipe atenti, ke la kafo estas turnata plurfoje dum la tago por ke la suno kaj vento atingu ĉiujn partojn. Ĉe roso kaj pluvo la kafo estas arigata kaj kovrata per grandaj ŝirmtukoj. Post la pluvo oni

devas denove — plejeble rapide — sterni la kafon, ĉar alie ĝi varmegiĝas kaj ekputras. Kelkloke oni sekigas la kafon arte, sed oni opinias, ke suna sekigo estas rimarkinde pli bona.

Polurado kaj kribrado

Lavita kafo estas glatigata en t.n. polurmaŝino post la senŝeligo. Tio rezultigas pli longedaŭran koloron kaj plibonan kvaliton. Post tio maŝino, kiu entenas diversajn cilindroformajn kribrilojn, apartigas la grajnoj laŭ la grandeco. Oni poste vendas la kafon kiel unuagradajn, duagradajn, kaj triagradajn grajnoj. Je la fino oni apartigas la bonajn grajnoj de la malbonaj kaj de fremda aĵo. La maturaj grajnoj preterpasas sur moviĝanta bendo kvin ĝis dek laboristinojn, aŭ oni uzas maŝinojn servatajn de po unu persono kaj ĉe kiuj la bendo estas movata per piedfrap-mekanismo. En ambaŭ okazoj oni apartigas la grajnoj per la mano.

(Tradukita el la Bremena gazeto *Weser-Kurier*—al kiu ni dankas pro la fototipio—n-ro 168, 22 julio 1950, de G. F. A. Milanowski.)

LA SANKTA BIBLIO

Nun havebla en luksa eldono kun leda bindo kaj orumitaj eĝoj. Bela kaj alloga vesto por la plej multe aĉetita verko en la mondo !

Tre taŭga por donaco.

Prezo 32ŝil. 6p.

plus 1ŝil. registrita afranko

Libroservo de U.E.A.

Heronsgate, Rickmansworth,

Herts., Anglujo

Monata letero

Stockholm

Gesamideanoj,

Plene moderna vivo kaj profunda tradiciemo karakterizas la socion de Svedlando, kaj tiun bildon supozeble nur momente perturbas, aŭ eble nur vualas, la mondkrizo, kiu ne evitas ankaŭ Skandinavion. Plene moderna vivo kaj tradiciemo karakterizas ankaŭ la eksteran kaj internan aspektojn de la bela ĉefurbo, Stokholmo, kies konstrubildon regas la vastaj, puritanaj linioj, tipe nordaj. Ankaŭ en la vivo oni ne devas longe serĉi la tradiciojn. Nur laŭ la hazardo ni ellevu unu ekzemplon—manĝ-tradicion: ĉiuĵaŭde en tuta Svedlando *ĉiu* manĝas pizosupon kun lardo kaj kiel deserton, krespon, laŭ malnova tradicio. Se vi estas gasto ie en la perfekte elektrizita lando, oni ekbruligas kandelon kaj kun rideto de agrabla memoro de la pasinteco oni diras: “La *vivanta* lumo tamen estas tre bela!”

Tiu ligiĝo kun la pasinteco klarigas la popularecon de la ekspozicio de lignoskulptaĵoj en la belsitua, apud-mara Nacia Muzeo. La majstro de la koloritaj, kuriozaj, karikaturaj, genie verkitaj lignostatuetoj, Aksel Petersson, pli vaste konata sub la nomo “Döderhultaren” (t.e. la Döderhultano — loknomo), mortis antaŭ 26 jaroj. La riĉa kolekto logas same la laikon, kiun kaptas la anekdota humoro de la artisto, kiel ankaŭ la esteton,* kiun entuziasmigas la talento de artisto—sen *unu* ismo. La statuetoj plejparte estas memor-bildoj el jam malaperinta mondo, kiu tamen vivas subkonscie en la animoj, kaj kiun revivigas la genieco de

unika artisto. La figuroj, koloritaj per konscia ŝparemo de farboj, gvidas niajn pensojn al la primitivista arto. Sed en la primitivismo de Döderhultaren mankas la senkulpa naiveco, la klaraj, abundaj koloroj. Lia maniero estas la senindulga, frapa forma simpligo de la naturalismo, kaj la adapto de la koloroj rememorigas al ni la impresionismon. La ekspozicio estas granda travivaĵo. Nun oni havas percepton pri la grandeco de tiu ĉi strangulo, kiu vivis sur la periferio de la socio, kiu suferis senribele mizeron ĝis sia 41-a jaro toleris mokon kaj klaĉon de eturbanoj kaj kiu senzorge disĵetis siajn trezorojn inter senkomprenaj homoj.

A. Petersson naskiĝis en Suda Svedlando el terkulturista, ne mal-riĉa familio. Aksel estis ĉiam la “nigra ŝafo”, por regula laboro li ne taŭgis. Lia vivo estis plena de kompleksoj, kiujn li kaŝis—precipe en sia iom tumulta erotika vivo—per krudeco. Sed sub tiu kruda surfaco estis delikata naturo, preta por adoro kaj plena de sopiroj. Nur unu homo komprenis kaj amis lin: la patrino. Sed malfeliĉe, ŝi mortis kelkajn semajnojn antaŭ la sensacia malkovro de la granda talento. Ŝi neniam eksciis, ke la filo “taŭgas”.

Aksel Petersson mortis en tuberkulozo (1925)—sidante, ĉar li ne volis lasi sin kuŝigi de la morto. La lastaj 26 jaroj pravas, ke en la duelo kun la morto li venkis.

Sincere via

Ferenc Szilágyi.

ATENTU ! Leteroj ne atingu la Centran Oficejon dum la unuaj du semajnoj de Aŭgusto pro la U.K.

* esteto=estetikulo

François Hayotte :

Memorigo pri ne-ekzistinto

DUM 1951 Britujo aranĝas grandajn festojn precipe por altiri eksterlandajn turistojn. Urboj, regionoj, historiaj lokoj serĉas profiti je tio kaj tiras el la forgeso okazaĵojn pasintajn. Ke oni eĉ memorigas personon, kiu fakte ne ekzistis, tio estas jam eksterordinara. *Baker Street* en Londono—konata al ĉiu, kiu pilgrimas al Rickmansworth—foje altiris homojn je serĉo de la domo en kiu loĝis la prototipo de la analiza detektivo: Sherlock Holmes (elp. ŝerlok hoŭmz). La kvartalo de la Baker-strato volas memorigi tiun ĉi neekzistinton, inventitan de Sir Arthur Conan Doyle, kuracisto kaj verkisto vivinta de 1859 ĝis 1930. Conan Doyle efektive kreis du tipojn: la majstro-detektivon kaj lian kronikiston, Doktoron Watson (elp. ŭotson). Povas esti, ke la kritikistoj de la moderna detektivromano taksas la kreaĵon D-ro Watson pli alte ol Sherlock Holmes.

Stranga kuracisto, tiu ĉi D-ro Watson, kiu je ĉiu momento estis preta akompani sian amikon je ĉaso de krimulo. Fidele li sekvis lin kaj koncize li notis ĉion, ĉar Sherlock Holmes malestimis gloron.

“Ventega, sovaĝa nokto je la fino de novembro. Holmes kaj mi sidis kune tutan vesperon silentemaj. Li sin okupis helpe de forta lenso je deĉifrado de originalskribo sur palimpsesto, dume mi enprofundiĝis en kirurgia tezo aperinta antaŭ nelonge. La vento bruegis tra Baker-strato kaj la pluvo vipis senbride la fenestrojn.”

Jen la tipa komenco de rakonto pri unu el la Holmes-aventuroj, legitaj

antaŭ kvindek da jaroj kaj ankoraŭ nun de milionoj da entuziasmoj. Kia mistero venas nun? Kia estos la persono, persekutata, petegonta helpon de Sherlock Holmes kaj de lia kunulo? Granda malvero tamen estas la aserto de D-ro Watson, ke li studis ion pri sia profesio. Bona kuracisto li ja certe ne estis, ĉar li ne havis la tempon sin okupi pri siaj malsanuloj, daŭre vojaĝante kun sia amiko. Ĉiufoje kiam tiu ĉi lin petis, D-ro Watson lasis siajn pacientojn kaj supozeble ili estis eĉ kontentaj morti en paco sen li!

Esence estas, ke la du homoj havis karakteron absolute kontraŭan. Holmes, la ĉefpersono, granda, svelta, serioza, nur cerbo kaj osto, analizanta ĉiujn aferaĵojn de la homa vivo kun glacia kaj senkompata logiko. Watson, pacienca kaj admiranta aŭskultanto, rondventra, apatia kaj senfantazia.

La komenco de tiu ĉi kamaradeco estas rakontata en la unua romano pri Sherlock Holmes *A Study in Scarlet* aperinta en 1887. En ĝi estas rakontate, kiel la du komencis ekloĝi en Baker-strato. Holmes komencis sian karieron kiel brila detektivo, Watson estis armea kuracisto eksiginta el la servado. Iliaj aventuroj aperis en kvar romanoj kaj kvindek ses mallongaj rakontoj, tiom ŝatataj de la anglalingva legantaro. Ĉi tiuj rakontoj aperis unue en la multlegata revuo *Strand Magazine* kaj entuziasmigis la publikon. Conan Doyle konstatis, ke li kreis ion, je kio li ne pensis. Holmes iĝis ĉiam pli populara, je la granda embaraso de lia

inventinto. Conan Doyle estis homo larghorizonta kaj ambicia. Li volis brili en multaj fakoj literaturaj. Kiel multaj tiaj verkistoj, kreintaj hom-tipojn, kiuj iĝis famaj, li multe pli alte taksis siajn projektotajn verkojn. Sed la publiko postulis Sherlock Holmes kaj ĉiam Sherlock Holmes.

La modelo de Sherlock Holmes laŭdire estis iu Doktoro Bell, kirurgo en hospitalo de Edinburgo, viro dotita je eksterordinara kapablo analiza. La modelon de D-ro Watson oni ne devas longe serĉi. Tio estis Conan Doyle mem. Anthony Hope skribis pri Conan Doyle: "Li verkis bonajn librojn, sed aspektis kvazaŭ li neniam estus aŭdinta ion similan en sia tute vivo."

La vivo de tiu ĉi eksterordinara verkisto evoluis sen grandaj perturboj. Naskiĝinte 22an de majo 1859 kiel filo de ŝtata oficisto en Edinburgo, li jam kiel knabo entuziasmiĝis pri aventur-rakontoj. Sesjara li jam montris talenton je rakontado kun granda fantazio. Kiel junulo li skribis rakonton pri lukto inter viro kaj tigro. La tigro formanĝis la viron! Doyle estis en embaraso pri tio, kiel fini la aferon taŭge. Tiam li diris: "Estas pli facile puŝi iun en situacion neelireblan, ol liberigi lin el ĝi." Ĉiu leganto de la Sherlock Holmes-romanoj scias, kiel tiu eldiro pli malpli veriĝis ofte poste.

Li studis en la universitato Edinburgo kaj dediĉis sin al la medicino. Li ne estis tre sukcesa, kaj kiam montriĝis, ke li povos vivi per siaj literaturaĵoj li estis efektive feliĉa. Li laboris kiel asistanto en Sheffield, poste en iu malgranda urbo en Shropshire, kaj fine en kvartalo proletara de Birmingham. Tiam li komencis verki siajn rakontojn. Poste li vojaĝis kiel

kuracisto sur balenĉasista ŝipo dum sep monatoj kaj pli poste li vojaĝis en Afriko. Li rigardis ĉi tiun epokon la plej mizera en lia vivo. Li daŭrigis la praktikadon sed sen granda sukceso. Kun bonkora naturo, li helpis al vaguloj, ciganoj k.s. sen pago kaj ofte mem donacis la medikamenton, kiun li preskribis. Strangan aranĝon li havis kun spicisto suferanta de epilepsio. La nutraĵojn li aĉetis ĉe li, kaj la spicisto dealkulis la prezon de la kuracista honorario! Se la spicisto bone fartis, Doyle fartis malbone! Li eĉ malsatis. Post 1890 li definitive rezignis pri kuracista profesio kaj vivis per siaj verkaĵoj.

Doyle estis idealisto, kaj ĉia formo de maljusto povis lin flamigi je pasia protesto. Tial li ekzemple laboris por aliigo de la verdikto en la proceso Slater, viro kondamnita pro murdo je dumviva enkarceriĝo. La iniciato de Doyle havis sukceson kaj poste Slater estis liberigata kaj ricevis kompenzon de ses mil pundoj pro la eraro.

La filo de Doyle mortis en la unua mondmilito kaj tio kunhelpis, ke Doyle fariĝis spiritisto. Li multon verkis pri la spiritismo. Li mortis en 1930.

Karaktero kaj talento harmonie kuniĝis en Conan Doyle kaj ĝuste ĉi tiuj ecoj havigis al li tiom da admirantoj.

Unu el la plej interesaj romanoj
aperintaj en le postmilita periodo
estas

INVITO AL ĈIELO

originale verkita de

James D. Sayers

prezo 8ŝil. aŭfranko 6p.

Havebla ĉe Libroservo de U.E.A.



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas : S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Kiu volas respondon, nepre sendu rpk. (Britoj pm.) por afranko.

La politika vivo de grekaj virinoj : Antaŭ nelonge oni donis al grekaj virinoj la voĉrajton. Ili nun havas la rajton kandidati por la parlamento.

Viroj kaj virinoj : Malgraŭ postuloj al egaleco kun viroj, virinoj devus pripensi, ke ekzistas pluraj fundamentaj diferencoj inter la seksoj. La mortcifero ĉe virinoj estas malpli alta, ol ĉe viroj, kaj kvazaŭ por kompensi tiun fakton, por ĉiu cento da knabinoj naskata, naskiĝas 106 knaboj. La infektaj malsanoj atakas pli da knaboj (krom kokluŝo) ol knabinoj. Virinoj povas atendi pli longan vivon, ol viroj. Knabinoj timas la nemateriajn aferojn, kaj estas pli ĵaluzaj, pli imagemaj, pli subjektivaj ol knaboj. Ili laboras pli diligente en la lernejo, sed tamen ne lernas pli. Knaboj pli inklinas al la matematiko kaj sciencaj temoj, dum knabinoj montras emon al la literaturo kaj la poezio. Pli granda nombro da virinoj provas sinmortigon, sed pli granda nombro da viroj sukcesas ! Ĉefas ne egaleco kun viroj, sed egaleco de rajto kaj eblo.

Blankhaŭtulino inter indiĝenoj : Daisy O'Dwyer naskiĝis 16 okt. 1860. Ŝi ricevis la taŭgan edukon por juna angla fraŭlino, kies destino estas edziniĝo, pozicio kiel socia gastigantino kaj estrino de multaj geservistinoj. Kiam ŝi havis 24 jarojn ŝi vizitis Aŭstralion, edziniĝis al ŝafbredisto, sed post kelkaj jaroj revenis


Londonon kaj fariĝis ĵurnalisto. Reirinte Aŭstralion por esplori akuzon pri kruelo kontraŭ indiĝenoj, ŝi tie restis kaj loĝis kun la indiĝenoj. Ili estis malpuraj, kruelaj, malsanemaj kaj kun strangaj religiaj ideoj. Ŝi tamen havis grandan influon sur ilin. La brita reĝo honoris ŝin pro ŝia helpo al primitiva raso pereanta sekve de influo de tute malsimila kulturo. En Anglujo ŝi estas preskaŭ nekonata, tamen estis unu el la plej neordinaraj figuroj en la historio de virina sindoŝo.

Konkurso : Ĉu vi konas historieton pri virino kies vivo estis elstara ? Por la plej interesa tia, mi donos libropremion. Tamen skribu mal-longe.

Recepto de la monato : (el Sicilio)
Kuniklo kun acid-sukera saŭco.

Dividu kuniklon en pecojn kaj kuiru ĝin en kaserolo kun $\frac{1}{4}$ -litro da vina vinagro, $\frac{1}{8}$ -litro da tomata pulpo, 2-3 pecoj da celerio, hakitaj olivoj, kaporoj, 3-4 servkuleroj da sukero kaj iom da salo. Boletigu ĝin malrapide dum $1\frac{1}{2}$ horoj aŭ ĝis ĝi moliĝas.

**La venonta numero
aperos en Septembro**



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

***Ekspedicio Kon-Tiki** de Thor Heyerdahl, trad. C. Brynildsen, lingve prilaborita de Stellan Engholm, eld. Eldona Societo Esperanto, 23 × 16cm. 210 p. kun 28 paĝoj de ilustraĵoj, bind., prezo 27 ŝil., afranko 6p.

Jam leginte recenzojn pri nacilingva eldono de ĉi tiu verko kaj aŭdinte la nomon Kon-Tiki tiel ofte sur la lipoj de seriozaj legantoj, mi alprenis la belan blubindilan volumon kun ora surpriso, kun vibro de antaŭĝuo. Palpante la sveltan volumon, kies ekstera aspekto kaj interna artpapero—lukso neatendita ĉe Esperanta eldonaĵo!—invitas al kareso, mi denove admiris la guston de la eldonintoj, kiuj jam pruvis sian guston en la afero de kungreftado de la tekniko kaj la arto.


La aŭtoro scias kapti la simpatian kaj atenton de la leganto jam en la komenco, kaj varbas nian simpatian

kunsenton per rakontado pri la moko kaj nekredemo, kiujn trafas liaj teorioj pri la origino de la polineziaj popoloj. Precipe ni, mokatoj, estas centprocente kun li spirite en lia strebado pruvi la validon de liaj konkludoj, ke la popolo de la sudmaraj insuloj fakte venis de Peruo 500 jarojn post Kristo sur flosoj de balzaligno. Jen la motivo por la ekspedicio: pruvi, ke tia vojaĝo—en la kadro de la limigitaj rimedoj disponeblaj en tiu antikva tempo—estis kaj ankoraŭ estas ebla.

Mi dubas, ĉu mi iam legis prozon, kiu tiel forte sentigis al mi, ke mi ne legas, sed aŭskultas al rakontanto, kaj des pli al rakontanto kiu sorĉe priskribas scenojn kaj homojn kaj travivaĵojn tiel ke ili aperas realaj antaŭ la anima okulo. Pri la scenoj en la praa ĝangalo, dum ili serĉas la balzalignon por la floso oni

preskaŭ povas flari la odorojn de la humida tropiko kaj palpi la ĉemizon gluiĝantan al la dorso.

Subtilan ironion havas la aŭtoro, kiel pravas la priskribo pri aŭdienco kun la Prezidanto de Peruo: alkonduko de suspekt-emaj soldatoj, kiuj transdonas lin al tri civiluloj por registro, kiuj poste prezentas lin al homo en senmakula uniformo, kiu



siavice cedas lokon al impona gravulo en eleganta vesto, kiu lin anoncas al nova grandulo kun oro, ŝnuroj kaj epoletoj

Jam sur la vasta oceano, kia mirinda mondo malfermiĝas al ni! Krom ekkoni la multajn strangajn kaj iafoje amuzajn kúnulojn kiuj aliĝas al la flosa dum ĝia naĝado trans Pacifikon, ni rigardas per la okuloj de la aŭtoro en la nekonatan terenon de la vastaj profundoj kaj gapas kun terursento al iuj timigaj loĝantoj el tiu mistera regiono. Ni lernas senpovigi kaj per la nudaj manoj kapti ŝarkon, monstron kun buŝo kapabla gluti tutan piedpilkon! Kaj ni ekscias multon pri la humoroj de la granda maro kaj la vento, pri la kvalitoj de planktono, tiu stranga kunmikso de etaj vivaĵoj kiu donas vivon al ĉiuj ceteraj estaĵoj en la maro, pri la reagoj de homoj tute izolitaj for de la mondo dum longa periodo. La libro estas tiel plena de interesaj informoj, ke oni povus senĝene ĉerpi el kiu ajn paĝo kun profito. Malgraŭ la alta prezo (kiu tamen estas la sama kiel la svedlingva eldono) ĉi tiu verko valoras, ke oni rezignu pri kelkaj tiel nomitaj "necesaĵoj" por povi ĝin akiri. La lingvo estas flua kaj bona kaj, krom kelkaj specialaĵoj ligitaj kun la uzo de S-ro Engholm kaj pri kiuj ekzistas malsamo de opinio, modela.

Mason Stuttard.

***Sveda Novelaro** : proleta antologio, trad. F. Szilágyi, eld. Sveda Laborista Esperanto Asocio, 19×12cm. 235 p. bind. 9 ŝil., aŭfranko 6p.

Ĉi tiu antologio de prolettendencaj noveloj prezentas fazon de la sveda literaturo, kiu samtempe posedas kelkajn universalajn trajtojn. Aldous Huxley iam asertis, ke verkistoj

komence aŭ ĉerpas sian materialon el faktaj fontoj por realisme registri sian subkonscian antipation al specifa medio, aŭ obeas la pelon de sekretaj sopiroj al neatingeblaj ĝuoj por kontentigi la subkonscie avidantajn apetitojn. Precipe aŭtodidaktoj apartenas al la unua kategorio, verŝajne pro la impono de la ĉiutaga medio kaj la fono—ofte mizera kaj malĝoja — kontraŭ kiu ilia vivo elvolviĝis. Tio estas precipa karakterizo de la jena novelkolekto, kies individuaj trajtoj elstare estas kronikado de krudaj realoj kaj, iafoje, detala analizo de motivoj kaj pensprocedoj. La epizoda karaktero de la noveloj konformas al la tendencoj de la lastaj jardekoj, kiam novelistoj elektis rezigni pri intrigo, konduko al surpriza kulmino (klimakso) kaj similaj rimedoj de antaŭaj generacioj de novelverkistoj. La tereno de la artistoj estas la kamparo, la laborejo, la arbaro kaj la proleta hejmo kaj tial la roluloj kaj scenoj trovas eĥojn trans la periferioj de Svedlando ĉar la sorto de la malriĉularo ne konas landlimojn.

La lingvo de la traduko estas ĝenerale bona, sed oni povas konstati, ke la nivelo de uzo ne atingas tiun de la originala verko de F. Szilágyi—fenomeno multfoje rimarkebla ĉe tradukoj, kie la formo de la origin-lingvo trudiĝas kaj rezultigas ne-bonajn konstruojn. Tiaj verŝajne estas: *sen ke li devus* (p. 100) anst. *sen tio, ke li devu* kaj *Sen ke li estus malŝparinta multe da tempo* (p. 219) kies signifo ŝajne estas *Ne malŝparinte multe . . .* Mi iom surpriziĝis je *Jezuo* (p. 189) spite de la Biblia *Jesuo*.

Verko interesa, sed ne inspira. Teknika produkto admirinda.

M.S.

***La 13a Mortis** : kriminalromano, de Louis Vetter ; trad. de Hans Borschert. Eld. Borschert & Riemasch. 191 p., kart., prezo 11ŝ. 6p., afranko 6p.

Pasaĝero serĉas libron, kiu distros lin dum teda vojaĝo. Li elektas krimromanon. La enhavo, kvankam ne de literatura nivelo, estas en sia genro relative altnivela. Li legas, ke baldaŭ post noktomezo, oni trovas viron mortigita. La murdinto estas unu el la dek du gastoj, kiuj tranoktas en apudmara domo. Policanoj estas alvokitaj. Okazas dua murdo, kiam denove dek tri homoj estas kune. Sentas sin pli proksime al solvo nek la detektivo, nek la leganto kaj tiu, kiam li povas orienti sin inter la roluloj, suspektas jen unu, jen alian. Tamen lia intereso ne forvelkas kaj kiam li atingas la finan paĝon,

surprizas lin, ke la horoj estas tiel rapide forpasintaj.

Ĉu ĉi tiu verko estas tia? Bedaŭrinde ne, ĉar se nia vojaĝanto ĝin aĉetos, li eventuale ne finlegos pro tio, ke la stilo venkos lian intereson en la historio ; tio dependos de lia lingva sento. La tradukinto, ekzemple, misuzas la sufikson *iĝ*, tro uzas komplikajn verbotempojn, enkondukas nenecesajn neologismojn (kiujn li cetere ne listigas). Tio kaj diversaj malglataĵoj kaj eraroj—eĉ la titolo (kiel presita) *La 13. Mortis*, montras, ke li ankoraŭ trovas sin sub la influo de la originala lingvo. Krimromano tiuspeca povas servi kiel ponto inter la lernolibro kaj la vera literaturo, sed ĉi tiun verkon mi kuraĝas rekomendi nur al neelektema vojaĝanto, kaj eĉ tion mi faras heziteme.

C. D. A. Capp.

Po 1ŝ. Reduktitaj prezoj po 3 rpk.

Arboj de la Arbaro kaj Kampo—40 paĝoj—multaj ilustraĵoj—priskriboj kaj uzeblecoj de oftaj arboj en Eŭropo.

Gaja Leganto per Esperanto—56 paĝoj—ŝercoj, anekdotoj, ludoj, k.t.p. perfekta por grupoj kaj klasoj.

Londonanidoj—98 paĝoj. La faritaĵoj de Londonaj lernejoj evakuitaj al la kamparo dum la pasinta milito, originale verkita de unu el ili—D. W. Munns—tiutempe 14-jara.

Premiaj Romanetoj—96 paĝoj. La plej bonaj romanetoj ricevita en konkurso—simpla lingvo. Tre bona legolibro por lernanto.

Po 1ŝ. 2p. afrankite, aŭ tri respondkuponoj

Eldonitaj de : **The Esperanto Publishing Co., Ltd.**

Mendu ĉe : **U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo**

Enigma Konkurso N-ro 60

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenbergh 28, Brussel II, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 58.

N-ro 128 : Al posedanto de metio mankas nenio. Ŝlosilvortoj : alciono, litanio, primolo, orakolo, sekundo, endivio, direkti, akapari, najbaro, tapioko, oriento, doktoro, energio, mespilo, erotika, turismo, impresio, orkideo, merkato, aksiomo, nankeno, kapsulo, apetito, skorpio, notario, ekspedi, nektaro, inflamo, oratoro.

N-ro 129 : kanono, balono, kotono, bombono, kokono, salono, kolono, patrono, kupono, violono, mentono, citrono, kantono, galono, kapono, musono, betono, barono, miliono, marono.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 56-a konkurso : S-ro C. Rogister (Belg.) 159 p., S-ro P. E. Schwerin (Aŭstralio) 157 p., S-ro M. Rétot (Franc.) 153 p.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias tion, mi ripetas, ke ĉiu M.A. de U.E.A. kun la sama ŝanco povas komenci la ensendon de la solvoj je kiu ajn momento. Por ĉiu tute korekta solvo mi kutime donas 5 poentojn, por havi la okazon rekompenci ankaŭ ne tute korektajn solvojn per malpli da poentoj. Tiuj poentoj estas enskribitaj en liston, kaj ies poentnombro kreskas, se ŝi aŭ li daŭrigas la ensendon. Ĉiufoje la tri personoj kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion, kaj ilia poentnombro estas nuligata. Se ili daŭrigas la ensendon, ili rekomencas kun 0 poentoj. Ĉar la solvoj aperas du monatojn post la enigmoj, la limdato por Eŭropanoj estas du monatoj.

Ekster Eŭropo oni havas iom pli da tempo. Se por iuj solvantoj la afranko estas tro alta, ili povas ensendi la solvojn de du konkursoj samtempe, kondiĉe ke la solvoj estu forsenditaj antaŭ ol la dumonata periodo por la unuaj solvoj finiĝis. Tiu kiu deziras pliajn informojn, aldonu respondkuponon al sia demando. En la septembra n-ro ne aperos enigmoj.

Enigmo N-ro 132 : La tuto konsistas el 92 literoj kaj formas spritan reklamon. 32-5-91-63-23-77 longkrura birdo ; 44-3-86-25-37-19-72-13 birdeto kun citronkolora plumaro ; 85-2-18-67-79-12-27 rabo-birdo ; 41-7-74-68-53-26-76-83-36-60-57 stilzbirdo kun ruĝaj plumoj ; 28-49-43-11-90-51-37-46-35-92 kant-birdo ; 20-66-37-8-52 naĝbirdo belega ; 42-4-16-61-67-58-24-1-73 mara birdo ; 30-22-10-9-60-31 plej konata birdeto ; 55-3-13-37-87-48-24 tetraego ; 47-50-64-84-26 floro, simbolo de pureco ; 14-29-88-8-83-27 bonodora floro ; 21-69-65-45-4-29-39-17-11-52 infaneto ; 89-33-78-38-34-40-53-20-59-31 maniero por studi la fiziologiajn fenomenojn ; 82-2-56-33-53-80-57 grava por Esperanto ; 70-81-62-71 orda numeralo.

Korekto : En la artikolo de A. D. Foote pri *Modernaj literonomoj* (n-ro de junio) mankis la jena de li proponita alfabeto : a, be, ce, ĉa, de, e, if, ga, ĝe, ha, iĥ, i, jod, oĵ, ka, el, im, na, o, pe, rod, es, ŝu, taŭ, vaŭ, vu, zed. Ne esprimas bedaŭron ke la ellaso okazis.—Red.



ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj :

I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	14.30–15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	22.15–22.20	Hilversum, 402m. I. (ĉiun duan lundon): V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 25.61m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	17.35–17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m., sur 19.60m.
	23.30–23.45	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	17.20–17.40	Roma. 25.40m., 31.35m. P. Radio Roma—Esperanto. Via Vitorio Veneto 56.
	21.35–21.40	Wien 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 445m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
Vendredo	17.20–17.40	Roma. Kiel merkrede.
Sabato	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

La elsendoj de Lille estos interrompataj inter 15 julio kaj 15 oktobro.

Senpaga ilustrita programo havebla ĉe la svisa stacio.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Lucien Laurat :

Rimarkoj pri pralingvo tuthomara

KELKAJ artikoloj de marŝalo Stalin kontraŭ la fama sovetlanda lingvisto N. Marr* aktualigis problemon delonge diskutatan. Mi ne intencas ĉi tie ekzameni, ĉu ĝenerale pravas aŭ malpravas akademiano Marr, mortinta antaŭ 15 jaroj. Mi simple menciui, ke Marr estis favora al lingvo internacia artekreita—li estis favora ne pro antaŭjuĝa senbaza simpatio al Esperanto, sed ĉar tiu favora konvinko logike sekvis el lia teoria sinteno. Du el la ĉefaj punktoj de la Marr-a tezo estas :

1. La historia evoluo iras de multlingveco al malmultlingveco kaj fine al unulingveco ;

2. artaj faktoroj, konscia ago de la homoj, ludas dekomence gravan rolon en la lingvo-evoluo, kaj la disvolviĝo de la civilizo pli kaj pli transformas la lingvo-evoluon en konscian, racian lingvo-kreadon.

Ne necesas substreki la signifon de tiuj tezoj por nia Esperanto-movado. Sed ĉu ili estas ĝustaj ? Pri la dua punkto multegaj lingvofakuloj interkonsentas, sed la unua estas objekto de gravaj kaj akraj diskutoj.

Laŭ la teorio de Marr, la homoj venis nur malrapidege, dum centmiljara evoluado, al sona, buŝa lingvo, komence tre primitiva, apenaŭ artikigita. Li akiris la konvinkon, ke komence ekzistis nur kvar prasonoj ankoraŭ maldisaj, kiujn pene kaj turmente produktis la voĉilaro ankoraŭ nesufiĉe preparita kaj

* Tiuj artikoloj aperis en *Pravda* de Moskvo, 20.VI, 4.VII kaj 2.VIII, 1950.

ekzercita de la prahomo. Tiuj prasonoj korespondas al imagoj aŭ ideoj same maldisaj, same konfuzaj. Pro la primitiveco de la tiamaj komunikiloj kaj transportiloj la triboj povis interkontakti nur etskale. Tial Marr kategorie neas la ekzisteblon de iu komuna pralingvo de la homaro. Li asertas, ke la lingvoj de la historia epoko estas jam la rezultatoj de sennombraj interkruciĝoj kaj kunfandiĝoj de la prahistoria periodo. Marr eĉ neas la ekziston de pralingvoj por la ĉefaj lingvofamilioj nuntempe konataj kaj difinitaj (hind-eŭropa, semida, uralalta k.t.p.) ; li deklaras, ke la lingvoj nunaj de tiu aŭ jena familio aŭ subfamilio, kvankam similaj, ne devenas disire el komuna praava lingvo, sed kreiĝis surbaze de novaj interkruciĝoj kaj kunfandiĝoj. Finfine tiu sama procezo kondukos al novaj interkruciĝoj ĝis kiam, en unuigota mondekonomio, naskiĝos lingvo tuthomara, konscie kaj arte kreita. Esperanto estas je liaj okuloj la unua praktika provo kaj materialigo de tiu tendenco.*

* * *

La Marran teorion kontraŭstaras ne nur Stalin (kiu ne estas fakulo kaj kies kritiko havas motivojn esence politikajn, ne sciencajn), sed ĉiuj anoj de la teorio favora al pralingvo. Kvankam Marr bazis sian tezaron sur la materialistan historikoncepton de

* Resumo de la Marra teorio aperis Esperantlingve en la jaro 1929 : A. P. Andreev, *Revolucio en la Lingvoscienco* (SAT-eldonejo) ; la ĵus aperinta verko de D-ro Ivo Lapenna *Retoriko* tre trafe reliefigas la elstarajn punktojn de tiu teorio (ĉap. II/5).

Marks-Engels, la okcidentaj lingvistoj marksistaj aŭ marksumaj neniam akceptis lian teorion. Sufiĉas mencii ĉi tie la nomojn de la famaj francaj lingvoscienculoj Marcel Cohen, Paul Rivet kaj Aurélian Sauvageot,* kiuj kritikis la Marrajn ideojn jam pli ol 15 jarojn antaŭ Stalin.

Estas interese kompari la Marran teorion kun teorio tute kontraŭa, kiun prezentis svisa scienculo antaŭ proksimume dek kvin jaroj. En tri volumoj aperintaj de 1935 al 1937† D-ro Arno Wadler klopodas montri per sennombraj vortkomparoj kaj radikanalizoj la ekziston de tut-homara pralingvo. Jam la titolo de lia unua volumo *La Babelo Turo* indikas elokvente la tendencon de lia tezaro. Dum Marr asertas kuniradan tendencon, D-ro Wadler asertas disiradan evoluon. Sed ankaŭ la deirpunktoj kaj la bazaj konceptoj de la du aŭtoroj rekte malas unuj la aliajn; dum Marr elektis kiel gvidilon la materialistan historikoncepton, D-ro Wadler inspiriĝas el la spiritualista, eĉ teozofia doktrino de la germana antropozofo Rudolf Steiner.

Laŭ D-ro Wadler komuna pralingvo ekzistis kaj estis parolata sur la Atlantida kontinento, kiun englutis la Oceano antaŭ kelkaj dekmil jaroj. Post la katastrofo la lingvoj de la disĵetitaj popoloj pli kaj pli diferenciĝis. Sed oni rajtas serioze dubi pri tiu hipotezo. Rilate la iaman ekziston de

Atlantido la nuntempaj geologoj ja interkonsentas, sed laŭ ili la kontinento malaperis jam antaŭ la apero de la *homo sapiens* sur la terglobo.

Tamen la sennombraj vortekvacioj de D-ro Wadler estas meditigaj, eĉ konsternaj; preskaŭ nekredeblajn similecojn li aperigas inter idiomoj gramatike malsimilaj, geografie antipodaj kaj historie disepokaj. Parenceto aperas inter lingvoj tiel malproksimaj kiel la korea kaj la centrafrikaj idiomoj, la ĉina kaj la hind-eŭropaj, la ural-altaja kaj la amerik-indianaj. Vortpruntoj ne povis okazi en tiaj geografiaj kondiĉoj, kaj la ekzemploj estas tro multenombraj, por ke oni parolu pri simpla akcidenta hazardo.

* * *

D-ro Wadler pravas la iaman ekziston de komuna pralingvo—sed la realo, neekzisto de komuna praujo de la homaro, ŝajnas neniigi la eblon de komuna pralingvo de la homaro.

Sed ĉu vere la tezoj Marra kaj Wadlera estas absolute neakordigeblaj? Pri la neekzisto de komuna pralingvo Marr sendube pravas. Pri la nekontestebla parenceto de ĉiuj homaj lingvoj D-ro Wadler donis konvinkajn pruvojn. Sed unuflanke, se pravas Marr asertante, ke komence la homa lingvaĵo konsistis nur el malmulto da maldisaj prasonoj tradukantaj malmulton da konfuzaj bildoj kaj ideoj, se aliflanke pravas D-ro Wadler pruvante la samecon de multaj sonbildoj por multaj idebildoj—kial ne supozi, ke tiu komuneco devenas ne de genta prakomuneco de ĉiuj homoj, sed simple de tre simila, paralela disvolviĝo de la homa spirito kaj de la homa voĉilaro en ĉiuj globopartoj, kie kreiĝis kaj evoluis specaroj de la

* Vicu pli speciale: Paul Rivet, *Sumérien et Océanien*; Aurélien Sauvageot, *Sur le vocabulaire des langues ouraloaltaïques*. S-ro Sauvageot rekte kaj krude atakas la Marran teorion en la volumo (1935) *A la lumière du marxisme* (pp. 160–168).

† Jen la titoloj de la tri verkoj de D-ro Wadler: *Der Turm von Babel* (1935), *Germanische Urzeit* (1936) kaj *Das Rätsel der Indogermanen* (1937)—Basel.

homaro? Oni trovas komunajn elementojn kaj radikojn en ĉiuj lingvoj de la tero, ĉar tre verŝajne pro siaj limigitaj ebloj cerbaj kaj laringaj, la prahomoj kapablis produkti nur limigitan nombron da fonemaroj.

Kvankam treege diversaj, la tezaroj de Marr kaj Wadler enhavas por ni esperantistoj elementojn same altvalorajn. La Marra teorio pri evoluo de lingvoj al unueco per konscia, arta kreago de la homoj pravigas nian penadon. La Wadleraj pruvoj pri la grandega nombro de komunaj radikoj en ĉiuj lingvoj de la globo povos nin trankviligi pri la estonta sorto de nia lingvo; eĉ kiam popoloj ĝis nun starantaj flanke aŭ rande de la internacia rilataro kaj parolantaj lingvojn ŝajne tre malsamajn de la hind-eŭropa fonto de Esperanto, eniĝos pli intense al la vivo internacia, ili jam trovos en Esperanto parton, kvankam iom alieciĝintan, de sia propra, praa vorttrezoro.

(daŭrigo de posta kolono)

prezoj estas tre malaltaj. Mi iris al la estro de la turisma oficejo, sed aŭdis de li, ke ili estas superŝutitaj per petoj reklami en tiu aŭ alia gazeto. Tamen konvinkita pri la sukceso de la faldfolio, li promesis subteni la peton antaŭ la urbestro. La sekvo: tutpaĝa reklamo en la jarlibro!

Ni poste nin turnis al kelkaj hoteloj kaj rakontis nian sukceson ĉe la urbestro. Tri el ili kaj privata entrepreno decidis reklami en la jarlibro 1951.

Estas espereble, ke la gesamideanoj agos konsekvence kaj petos tarifojn kaj se eble subtenos tiujn reklamantojn. Nur tiel ni povos vastigi nian aferon en komercaj sferoj.

Kiel sukcesi

La gravo de turismaj broŝuroj en Esperanto

De tempo al tempo oni legas, ke iu urbo eldonis Esperantlingvan turisman faldfolion aŭ broŝureton. Tio kutime estas la rezulto de longedaŭraj klopodoj de lokaj gesamideanoj. Por doni kuraĝon al aliaj, S-ro Drs. F. Roose, D. de U.E.A. en Brugge, donas la jenajn faktojn pri sia sperto.

Okaze de kongreso de Flandra Ligo Esperantista en Brugge en 1938 la tiea sekcio klopodis konvinki la urbestron pri la eldono de propagandmaterialo pri Brugge en Esperanto. La urbestro estis tre skeptika, sed post novaj insistoj ĝi cedis, kaj la eldono aperis en 1939. La sukceso estis granda kaj tuja, kaj faris grandan impreson. Post la milito oni devis denove eldoni prospektojn kaj leviĝis la demando, ĉu eldoni en Esperanto? La lokaj gesamideanoj devis uzi bonajn argumentojn por konvinki la personaron en la turisma oficejo, sed fine sukcesis kaj oni denove eldonis Esperantan prospekton. La sukceso estis grandega. Apenaŭ pasas tago en kiu ne alvenas petoj pri la Esperantlingva prospekto, kaj la estro de la propaganda fako konfesis ke li estas plene konvinkita pri la propaganda valoro de Esperanto. Brugge tiel atingis publikon, kiun ĝi alimaniere ne estus atinginta.

Necesas pripensi, ke nia U.E.A. bezonas monon. Unu el la rimedoj havigi al ĝi financan subtenon, estas akiri reklamojn por la gazeto kaj jarlibro, kaj ŝajnas, ke la delegitoj ne sufiĉe ekspluatas tion. La anonc-

(daŭrigo en antaŭa kolono)

Internacia Konkurso

1951

MAROKO, kiu en la komenco de la jaro ne montris apartan tendencon al sukceso, subite faris surprizan salton al la supro. Tio estas tre emfaza indiko pri tio, kio eblas per du-tri dumvivaj membroj. Tute aparte de la valora kontribuo al la landa klopodo, aliĝo en kategorio Dumviva Membro estas prudenta asekuro kontraŭ la fluoj kaj necertaĵoj de la vivo. Membroj do serioze pripensu tiun fakton. Per pago de 20-oblo de la ordinara MA-kotizo oni povas certigi al si ĉiujn rajtojn kaj privilegiojn de individua membro por la resto de la vivo. Povas esti, krome, ke vi per tia aliĝo donos sukceson al via lando en la konkurso.

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Maroko ..	400	525	131.2
2.	Finnlando ..	2000	2595	129.7
3.	Germanujo ..	2400	3035	126.4
4.	Portugalujo ..	600	755	126.0
5.	Brazilo ..	2500	3015	120.6
6.	Italujo ..	1700	2040	120.0
7.	Izraelo ..	300	360	120.0
8.	Sudafriko ..	250	285	114.0
9.	Japanujo ..	800	875	109.4
10.	Belgujo ..	2100	2226	106.0
11.	Urugvajo ..	250	265	106.0
12.	Britujo ..	12000	11644	97.0
13.	Svislando ..	1400	1355	96.8
14.	Danlando ..	2800	2605	93.0
15.	Hispanujo ..	1100	1005	91.4
16.	Aŭstralio ..	900	800	88.8
17.	Francujo ..	5700	4963	87.0
18.	Nederlando ..	5000	4155	83.1
19.	Kanado ..	250	205	82.0
20.	Argentino ..	800	640	80.0
21.	Norvegujo ..	1400	1060	75.7
22.	Novzelando ..	800	605	75.6
23.	Usono ..	3000	2151	71.7
24.	Svedlando ..	5300	3785	71.4
25.	Irlando ..	250	165	66.0
26.	Kubo ..	250	125	50.0
27.	Aŭstrujo ..	1000	470	47.0
28.	Islando ..	500	55	11.0

Kio estas via V.-K. ?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn en la signifoj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociento estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselkto aŭ nescio.

(Respondoj sur p. 215)

1. **Tabureto** : (a) bildo el fortika materialo, (b) malgranda tamburo, (c) seĝeto sen dorsapogilo ?
2. **Tarantelo** : (a) vigla danco, (b) dika araneo, (c) ŝorĉistino ?
3. **Kerubo** : (a) ludkarto, (b) militista ĉapo, (c) supernatura estaĵo ?
4. **Galaksio** : (a) stelgrupo, (b) floro, (c) surŝua piedvesto ?
5. **Fleso** : (a) vitra vazo, (b) fiŝspeco, (c) viando ?
6. **Emani** : (a) eliĝi nevideble, (b) liberigi, (c) kovri glazure ?
7. **Redingoto** : (a) jako, (b) ŝipo, (c) bonodora floro ?
8. **Rikani** : (a) duonridi, (b) tropostuli, (c) tropagigi ?
9. **Sentenco** : (a) registara ordono, (b) frazo enhavanta moralan principon, (c) juĝo ?
10. **Eventuala** : (a) tre grava, (b) povanta okazi, (c) fina.

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

F. Omelka

VI. Leonard Seppala (*daŭrigo*)

LA valo trankviliĝis. Finsonis la bruego de la lavango, ĉesis la obstina lukto de la homo kun la naturo. Nur en la alto ekhurlis nova atako de la ventego.

La senmovo daŭris unu sekundon, du sekundojn, poste jam kelkajn minutojn.

Kaj subite la neĝo moviĝis. Poste denove kaj denove. Kaj jen aperis super la neĝo la kapo de Balto.

La hundo rigardis antaŭen, post ĝi turnis sin. Ĝiaj okuloj estis plenaj de mirego. Kelkaj momentoj pasis antaŭ ol ĝi komprenis. Sed poste ĝi puŝis la piedojn en la neĝon kaj rastis kaj rastis.

Post nelonge aperis la kapoj de la unua entombigita duopo. Tiumomente Balto ĝoje ekbojis kaj komencis rasti ankoraŭ pli obstine. La du liberigitaj hundoj skuis sin kaj tuj komencis helpi Balton. Neĝo forflugis dekstren kaj maldekstren kaj novaj kaj novaj duopoj de la hundoj estis liberigataj !

Finfine aperis la sledo kaj apud ĝi Seppala. Li estis trafita per la lavango tiom malfeliĉe, ke li puŝegis per la kapo la sledon kaj senkonsciigis.

La hundoj ariĝis ĉirkaŭ li ĝoje bojante, sed ili tuj silentis. Ilia sinjoro ne moviĝis.

La bestoj staris konfuzite. Neniu eĉ moviĝis. Kaj eble la tuta kunjungaĵo frostiĝus en tiu pozicio, se ne ĉeestus Balto.

Kiu scias, kial ĝi tion faris. Eble ĝi volis esprimi la amon al sia sinjoro, eble vekiĝis en ĝi la sama sento, kiun ĝi havis por siaj suferantaj idoj, eble bedaŭro kaj kompatato devigis ĝin al tio, ke ĝi alproksimiĝis ĝis sia sinjoro kaj komencis ĉirkaŭleki lian vizaĝon.

Kaj tio helpis. La vundito palpebrumis kaj post momento li malfermis la okulojn. Balto ankoraŭ kelkfoje lekis lin kaj poste ĝoje ekbojis.

Seppala ĉirkaŭrigardis. La tuta kunjungaĵo kuŝis en la neĝo kvazaŭ en tombo. Dum Balto por atingi la surfacon devis tralukti nur kelkajn decimetrojn, ĉirkaŭ Seppala etendiĝis la neĝamasoj pli alten ol du metrojn. Eĉ se li ne estus vundita, el tiu ĉi tombo li neniam liberigus sin per propraj fortoj.

Li dankeme rigardis Balton kaj ankaŭ la ceterajn hundojn. Li dankis la bestojn pro si, siaj edzino kaj infanoj, kiuj streĉe atendas lian revenon, kaj pro tiuj en Nome, kiuj sopire atendas la savan seron.

La seron !

Ĝi ja devis esti kiel eble plej baldaŭ en Nome ! Kaj li kuŝas ĉi tie en la neĝo, kvazaŭ li havus sufiĉe da tempo—

Li provis leviĝi, sed ne sukcesis. Lia kapo zumis, liaj okuloj nubiĝis. La tuta korpo estis kvazaŭ bruligata.

Li ekkonsciis, kiel terura estas lia situacio. Li kuŝas tie ĉi sola en la dezerto, super li bruegas la ventego, kiu senĉese ŝutas novajn kaj novajn neĝtavolojn—kaj malproksime li estas atendata kun firma fido. Li trompos iliajn atendon kaj esperojn. La paketo, kiu jam veturis milojn da kilometroj, kiun tenis tiom da manoj de oferemaj homoj, haltos ĉe li. Seppala ne alvenos.

La turmentaj pensoj kaŭzis al li pli grandajn dolorojn ol la vundita kaj frostigita korpo. Kaj nur la dolorigaj piko de tiuj pensoj devigis lin denove leviĝi. Li ŝanceliĝis kaj falis denove en la neĝon. Tion li ripetis kelkfoje, ĝis li fine sukcesis rampi sur la sledon.

“Veturu, Balto !” li diris senenergie kaj senkonsciigis.

Balto tiris la sledon el la tranĉeo, kiun ĝi kun la hundoj elfosis, kaj veturis sur la deklivo tiom longe, ĝis ili preterveturis la falegintan lavangon. Poste ĝi malsuprenveturis en la liberan valon kaj sur la ebena surfaco ili ekveturis pli rapide. De tempo al tempo li rigardis malantaŭen por konvinkiĝi, ĉu Seppala kuŝas ankoraŭ sur la sledo.

La kuranta stafeto prezentis neesprimeble malgajan bildon.

Seppala kuŝis sur la sledo sen moviĝo. La hundoj, kvazaŭ ili scius, ke ĉi tie okazas io eksterordinara, veturis serioze kaj trankvile.

Subite la sledo puŝiĝis je ia malmola elstaraĵo. Ĝi suprensaltetis, ŝanceliĝis kaj tuj sekve Seppala kuŝis sur la malmola neĝo. Falante li puŝiĝis per la kapo al la tero tiom forte, ke la doloro vekis lin el la senkonscio.

Li sidiĝis sur la tero kaj konfuzite ĉirkaŭrigardis. La sledo estis jam kelkajn metrojn antaŭ li kaj veturegis pluen.

“Balto ! Balto !” li vokis ekscitite.

La hundo rigardis malantaŭen kaj revenis al sia sinjoro. Ĝi kelkfoje ekbojis kaj komencis froti sin ĉe la kruroj de Seppala.

“Vi estas bonkora, Balto,” karesis ĝin Seppala. Kaj rigardinte la kompason li aldonis : “Vi kondukas nin bone.”

Dua nokto vualkovris la neĝblovitan regionon. Kaj la ventego ne ĉesis.

Seppala nutris la hundojn kaj daŭrigis la veturon la tutan nokton. De tempo al tempo li veturis kun plena konscio, sed jen kaj jen li senpove dormetis. Kaj tiam la sekureco de la veturo restis nur ĉe Balto.

La duan tagon la stafeto jam nur treniĝis. Ĉiuj hundoj havis la piedojn tiom ŝirvunditaj, ke post la kunjungaĵo restis strio de ruĝa sango. La korpojn de la bestoj kaj de la elĉerpita homo skuis febroy.

En kompatinda stato la stafeto atingis Unalaklik-on. Ĝi veturis pli ol 250 kilometrojn, estis survoje kvardek kvin horojn kaj travivis neesprimeblan suferadon.

La Unalaklikanoj, kiuj vivis jam kelkajn horojn en atmosfero de timo kaj espero, veturis renkonten al Seppala. Ili volis premi lian manon, danki lin, doni al li refreŝigaĵon.

Seppala ĉirkaŭis ilin per malforta rigardo, senvorte montris al la paketo da sero kaj preskaŭ neaŭdeble flustris :

“Flegu la hundojn !”

Poste li renversiĝis kaj senkonsciigis.

En tiu momento jam Gunnard Kasson alfiksis la paketon al sia sledo.

Kaj dum oni forkondukis la hundojn kaj forportis la senmovan korpon de Seppala, por redoni al li la vivon, la lasta, la decida ero de la stafeto direktis sin al la maro.

(daŭrigota)

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Jakobsen. Al Ges. Jakobsen (ĈD en Danlando) en Aabyhøj, filo **Poul Johan**, 14 junio 1951.

Edziĝo

Jay-Kennedy. F-ino M. Jay, eks-prezidanto de Brita Esperantista Asocio al S-ro D. Kennedy, Estrarano de U.E.A. 21 junio 1951. Adreso : 21, Westfield Rd., Bishop Auckland, Durham, Anglujo.

Landureau-Knecht. F-ino A. Landureau al S-ro Fernand P. Knecht D. de U.E.A. en Casablanca, Maroko, 16 junio 1951.

Al ĉiuj sinceran gratulon !

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj gesamideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—
RED.

Cotton, S-ro Prof. Aimé 82-jara, en Sèvres, Francujo, 14 aprilon 1951. Membro de la Akademio de Sciencoj, Honora Profesoro de la Fakultato de Sciencoj de Parizo, S-ro Cotton ĝuis eminenton ne nur

en sia lando, sed en vastaj rondoj. Precipe pro siaj eltrovoj kaj studoj en la sfero de la optiko kaj magnet-optiko li akiris renomon. Dum la okupado la Gestapo lin arestis pro lia rezisto al la germanoj. Multjara kaj fervora apoganto de la ideo de internacia lingvo kaj de Esperanto.

May, S-ino, edzino de F. J. May, lernejestro de Lymington, Anglujo ; 3 majon 1951 en Dagenham.

Rubčić, S-ro Anton, 66-jara, 13 majon 1951 en Ŝibenik, Jugoslavujo. Pioniro en Dalmatio kaj iama prezidanto de la societo en Split.

Kio estas via V.-K.?

Respondoj (vidu p. 212)

1. (c) **Tabureto** estas seĝeto sen dors-apogilo.
2. (a) **Tarantelo** estas vigla itala danco.
3. (c) **Kerubo** estas supernatura estaĵo.
4. (a) **Galaksio** estas stelgrupo.
5. (b) **Fleso** estas fiŝspeco.
6. (a) **Emani** signifas eliĝi nevideble.
8. (a) **Rikani** signifas duonridi.
7. (a) **Redingoto** estas jako.
9. (b) **Sentenco** estas frazo enhavanta moralan principon.
10. (b) **Eventuala** signifas povanta okazi.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 239

4-an de Junio 1951

NOVA ESTRARANO

D. Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Anglujo.

NOVAJ KOMITATANOJ

I. Borovečki, Buconjićeva 4/II, Zagreb, Jugoslavujo.

J. Guillaume, 8 rue Camille Saulnier, Le Vesinet (S. et O.), Francujo.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Majo, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	5977	3944
Individuaj membroj :		
MJ	708	741
MA	3880	4212
MS	272	273
Patronoj ..	15	16
DM	203	215
HM	56	58
	— 5134 —	5515
	11111	9459

DELEGITOJ

Andoro

Sant Juliá de Loria. D : J. Travesset Pijoan, Industria Metallurgica d'Alumini.

Britujo

Bradford. VD : J. V. Midgley, 13 Parkcliffe Road, Undercliffe. Tel : 37673.

Manchester. D : F-ino M. Larrad, 9 East Avenue, Garden Village, Manchester 19. Tel : Rusholme 5098.

Rye. D : vakas.

Ĉinujo

Canton. D : vakas.

Francujo

Pussay (Seine-et-Oise). D : E. Aubertel, 145 Rue Etienne-Laurent. Tel : 45.

Strasbourg (Bas-Rhin). VD : F-ino E. Dietz, 7 rue Sengenwald. Tel : Central-Maison 141.

Thiers (Puy-de-Dôme). FD (Bankaj aferoj) : G. R. Gousseau, Banque de France. Tel : 20.

Germanujo

Bremen. FD (Juro) : vakas

Düsseldorf. D : J. Haus, Am Gatherhof 43, (22a) Düsseldorf-Rath.

Wieda. D : F. A. Weber, Silberbach 66, (20b) Wieda.

Izrael

Kfar-Saba. D : Jeraĥmiel Giladi, Eliezer Kvartalo.

Petach-Tikva. FD (Ĵurnalismo) : O. O. Berman, 22 Baron Hirsch Str.

Tel-Aviv. FD (Komerco—paperaĵoj) : D. Engelsher, Heĥaluzim 5.

Nederlando

Eindhoven. FD (Bankaj aferoj) : J. van Meel, 1e Akkermuntstraat 9.

Nov-Zelando

Auckland. FD (Instruado) : E. Rose, 930 Dominion Road, Mt. Roskill.

New Plymouth. D : D-ro J. Hamvai, c/o Post Office.
FD (Folkloro) : La D.

Portugalujo

Viseu. D : D-ro J. Bigotte de Almeida, Bairro Novo do Liceu.
FD (Ĥilatel) : La D.

Svislando

Bellerive. D : vakas.

Usono

Chapel Hill. D : vakas.

Kansas City (Missouri). D : F-ino P. O. Jones, 3206 East 26th St. Terrace, Kansas City 1. Tel : Ha-2680.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

S-ro E. W. Anjou, Göteborg, Svedujo

Prof. L. Apcher, Meknes, Maroko

S-ro C. Thollet, Port Lyautey, Maroko

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

270. Smart, H. W., Brooklyn, Usono

271. Clewe, J. F., Los Angeles, Usono

272. Stock, C. J., Sydney, Aŭstralio

273. Hudson, F-ino C. W., Seaham, Anglujo

274. Supremowicz, A., Cheltenham, Anglujo

275. Dodson, H., Willaston, Anglujo

DONACOJ. R. Olivaux 2ŝ. 3p., A. D. Newman 14ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : du pecnoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Juna Irlandano interesata pri grenmuelado, algoekspluato, agrikulturo (precipe porkbredado) ferios en Finnlando en la dua duono de julio, kaj volas kontakti Esperantistojn (prefere kun ioma kono pri la angla lingvo). Skribu al C. Glynn, ĉe Poste Restante, Ĉefpoŝtoŝicejo, Helsinki, Finnlando.

Antonio Pastor, Ercilla 49, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.

Esperanta Sanulejo estas fondota, kie oni povas vivi kaj lerni plejeble fariĝi centjara. Kiu sendos donacon por la sanulejo povos demandi laŭplaĉe. Volonte respondos D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

Urba ekspozicio en septembro enhavos Esperantan budon. Bv. sendu bildkartojn, gazetojn, al Jarrow kaj Hebburn-a Grupo, 6 Elmfield Road, Jarrow, Anglujo. Respondo garantiata.

Japano deziras korespondi tutmonde. S-ro Humitake Joŝida, 109 Curumaki-ĉo, Ŭaseda, Ŝingiku-ku, Tokio, Japanujo.

Deziras interŝanĝi pm. kaj p.k.i. S-ro Bohumil Kupa, Havliĉkova 1016, Pardubice, Ĉeĥoslovakujo. Nepre respondos.

Mi deziras informojn pri "sandetruigaj radioj". Hans Widmer, Sonnenberg 23, Ennatbaden, Svislando.

AAAAAAAAAlt ! Legu Jarlibron pĝ. 55.

Villa Nova, Rua Alfandega 35, Recife-Pernambuco, Brazilo, interŝanĝas poŝtkartojn afrankitajn bildflanke.

Fraŭlino Ottavia Gallenca, via Arsenale 10, Torino, Italujo, deziras korespondi.

Esperanto-Societo Husimi en Kioto deziras interŝanĝi geknabdesegnaĵojn por prepari ekspozicion de eksterlandaĵoj en Marto 1952. Bonvolu sendi materialon laŭ adreso: Terai-Riiti, 764 Tōantyō, Husimi-ku, Kioto, Japanujo.

Vizitonto al Festo de Britujo. Tiuj, kiuj deziras malkaran, neluksan loĝejon kun frumatenmanĝo ĉe samideanoj sin turnu al FD de UEA (Junulturismo) en Londono. Rabato por Esperantistoj.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekretario, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

S-ro kaj S-ino Young deziras korespondi kun Esperantistoj pri ĉio interesa. Eric Young, 6 Church St., Lambton, Newcastle, Aŭstralio.

Esperantistoj, kiuj skribis al Newcastle Grupo kaj ne ricevis respondon bv. skribu al nova adreso de kiu ili ricevos respondon, sed skribu klare viajn nomojn kaj adresojn. La sekretario, 51 William St., Tighes Hill, Newcastle, Aŭstralio.

Letervespero okazos meze de Septembro. Respondo al ĉiuj leteroj kaj poŝtkartoj garantiata. Adresu: Esperanto-grupo, Eschenweg 11, (17a) Karlsruhe, Germanujo.

Essen, la koro de la germana karbmineja regiono, invitas la tutan mondon korespondi reciproke kaj viziti ĝin. Tranokteblecoj laŭplaĉe en malmultekostaj aŭ luksaj hoteloj aŭ ĉe samideanoj. Vizitservo konigos la mirindan ĉirkaŭaĵon. Skribu al D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

Ekspozicio en butikfenestro dum Aŭgusto. Kirkcaldy Esperanto-Grupo petas montraĵojn. Bv. sendu al Sek., 2 Lady Helen St., Kirkcaldy, Fife, Skotlando.

Tutmondaj Esperantistoj ! La domo por la propagando de Esperanto aranĝos en decembro 1951 grandegan ekspozicion. Montru, ke ekzistas Esperantistoj en la mondo. Atentu, ke via lando estu reprezentata. Sendu tuj grandamase leterojn, poŝtkartojn, ilustritajn, prospektojn, turismajn broŝurojn, revuojn, gazetojn, ĵurnalojn, librojn, afiŝojn, flugfoliojn, k.t.p. Sendu al S-ro Pirotté Jozefo, Rue César de Paepe 8, Micheroux-Soumagne, Liège, Belgujo.

Ĉu vi deziras ricevi poŝtmarkojn de Izraelo, de la Proksima Oriento, ilustritajn poŝtkartojn kaj ilustritajn gazetojn de Izraelo? Sendu al mi poŝtmarkojn de via lando, sed nur pm. kiuj aperis dum la jaroj 1950-51 (uzitaj kaj neuzitaj). Mi respondos nur per aerpoŝto. Mia adreso: Prof. Rosenfeld Arnold, Rchow Sireni 19, CHULON, Szykun Chadasz, Izraelo.

Mondsteno, plej simpla stenografio Esperanta. Du plenaj lerniloj (8 paĝoj kontraŭ 3 respondkuponoj. Max Mayr (13b) Warngau-Reitham 76, Germanujo.

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita
de lia ĵus retrovita korespondo
kun la francaj eminentuloj.
Prezentado kaj komentado de
Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901–1906—388 paĝoj

2a volumo, 1907–1914—374 paĝoj

• 21 × 14.5cm., bindita

NUNA PREZO :

Ĉiu volumo 21ŝ. 6p., afr. 9p.

La korespondaĵoj de eminenta
homo ĉiam konigas detalojn de
vivo, karaktero kaj sentimento
de la skribinto tiel ke personaj
leteroj kompletigas biografiojn.
En tiu ĉi libro ne temas nur pri
leteroj de la majstro, sed ankaŭ
pri tiuj direktitaj al li de francaj
gvidantoj de nia ideo en la frua
epoko de la movado. Tiu ĉi
libro lumigas la pasintecon kaj
detruos aron da legendoj.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO